

4a PASKA DIMANĈO – 21an de Aprilo 2013

AL MIAJ ŜAFOJ MI DONAS ETERNAN VIVON – Komento al Evangelio de P. Alberto Maggi OSM

El la evangelio laŭ Johano 10, 27-30

En tiu tempo Jesuo diris: „Miaj ŝafoj aŭskultas mian voĉon; Mi konas ilin, kaj ili Min sekvas.

Al ili Mi donacas vivon eternan: ili neniam pereos. Neniu forkaptos ilin el mia mano.

Mia Patro, kiu donis ilin al Mi, superas ĉiujn; pro tio neniu povas forkapti ilin el la mano de mia Patro. Mi kaj la Patro estas unu.“

Lastan fojon kiam Jesuo prezentiĝas en la templon de Jerusalemo la religiaj aŭtoritatoj klopodas lin mortigi, ĉar ili lin akuzas esti basfemulo. Por kompreni la malmultajn versiklojn kiujn la hodiaŭa liturgio prezentas al ni, ĉapitron 10 de Johano, versiklojn 27-30, ni devas ilin enmeti en la kuntekston. Kiu estas la kunteksto?

Estas tiu de la festo de la dediĉo, de la konsekro de la templo. Do estas iu konflikto inter Jesuo, vera templo de kiu disradias la amo, la mizerikordo, la kompato de la Patro, kaj la templo de Jerusalemo kie la vera Dio nomiĝas avantaĝo, nomiĝas intereso, nomiĝas trezoro.

La religiaj aŭtoritatoj ĉirkaŭas Jesuon kaj demandas al li laŭlitere "ĝis kiam vi forprenos de ni la vivon?". Tio estas tradukita per "ĝis kiam vi tenos nin en necerteco", sed la evangeliisto skribas "*Ĝis kiam vi forprenos de ni la vivon?*" Tio estas la spiro. Kion tio signifas? La agado de Jesuo doni la vivon por ke la homoj ĝin havu plene – signifas ĝin forpreni de la religia institucio kiu pretendas male submeti kaj regi la homojn.

Kaj ili demandas de Jesuo ĉu li vere estas la mesio. Jesuo respondas ke la kredindeco de lia agado dependas nur de liaj agadoj. "*La agadoj kiujn mi plenumas en la nomo de mia Patro*". La agadoj kiujn Jesuo plenumas estas ĉiuj agadoj kiuj plilongigas la kreivan agadon de la Patro, kiu komunikas la vivon al la homoj, redonas la vivon al la homoj kaj pliriĉigas la vivon de la homoj. Estas la agoj laŭ kiuj oni juĝas ĉu iu persono venas de Dio aŭ ne, ne la teorio nek la doktrino.

Kiam la agadoj komunikas vivon la agado de la individuo venas sendube de Dio, ĉar Dio estas la aŭtoro de la vivo. Kaj Jesuo ilin denuncas: "*Sed vi ne kredas ĉar vi ne estas parto de mia ŝafaro*". Estas teruraj vortoj. La akuzo de Jesuo estas tre serioza: se ili ne estas parto de lia ŝafaro, de la ŝafaro de Dio, signifas ke ili estas rabistoj, ŝtelistoj aŭ murdantaj lupoj.

Jesuo do estas denoncanta la plej altajn religiajn aŭtoritatojn kiuj ne estas parto de la ŝafaro, de la popolo de Dio, sed estas liaj ĝismortaj malamikoj.

Kaj jen la versikloj kiujn la liturgio prezentas al ni: "*Miaj ŝafoj aŭskultas mian voĉon*". Kial ili aŭskultas lian voĉon? Ĉar la mesaĝo de Jesuo ne sin trudas, sed sin proponas. Jesuo ne devigas, sed proponas. Kaj lia mesaĝo estas la respondo de Dio al bezono je vivpleneco kiun ĉiu persono portas en si mem. "*Mi konas ilin,*" – la verbo 'koni' indikas profundan, intiman konon – "*kaj ili Min sekvas.*"

Kial ili lin sekvas? Ĉar ili fidis je li. Ili fidis je la ŝafisto kiu pretas doni la vivon por sia ŝafaro. Kaj Jesuo daŭrigas: "*Al ili Mi donacas vivon eternan*". Sekvi Jesuon, orienti do propran vivon – kiel Jesuo – por la bono de la homoj, kunlabori kun li en la krea agado redoni la vivon, gajigi la vivon kaj komuniki la vivon al la aliaj, el ĉio tio sekvas ke la persono havu en si mem vivon tiom altvalitan ke ĝi estu nedetrubla.

Kiu laboras por la vivo de la aliaj havas en si mem vivon tiom plenan kiun la morto eĉ ne povos iel skrapeti. *"Ili neniam pereos."*, certigas Jesuo. Kaj poste Jesuo atentigas la religiajn aŭtoritatojn ke ili ne klopodu rekapti la ŝafaron kiun li liberigis: *"Neniu forkaptos ilin el mia mano."* Jesuo do atentigas la religiajn aŭtoritatojn ke ili ne klopodu rekapti la popolon kiun li estas liberiganta.

"Mia Patro, kiu donis ilin al Mi, superas ĉiujn; pro tio neniu povas forkapti ilin el la mano de mia Patro." Jesuo estis parolinta pri ŝafaro en siaj manoj, nun li diras ke ĝi estas en la manoj de la Patro. Jesuo kaj la Patro estas ununura afero, kiel Jesuo mem asertas: *"Mi kaj la Patro estas unu."*

Jesuo pretendas la dian kondiĉon. Tio estas blasfemo! Jesuo blasfemis, ni estas en la templo kaj la teksto pludiras: *Refoje la Judoj prenis ŝtonojn por lin ŝtonmortigi.* Kial? Jesuo en tre ironia formo diras: *"Mi vidigis al vi bonajn agojn flanke de mia Patro, pro kiuj el tiuj vi volas ŝtonmortigi min?"* Ili respondas: *"Ni ŝtonmortigas vin ne pro bona ago, sed pro blasfemo, ĉar tiu kiu estas homo iĝas Dio"*.

La denunco de la evangeliisto estas tre serioza kaj tre grava. La plej altaj religiaj aŭtoritatoj, tiuj kiuj devintus konigi al la popolo la volon de Dio, kiam tiu volo manifestiĝas en Jesuo – kaj la volo de Dio estas ke ĉiu homo per la praktikado de amo simila al la lia iĝu lia filo – ili taksas tion blasfemo, krimo punenda per morto.

La denunco de la evangeliisto do estas terura. De la religiaj aŭtoritatoj la projekto de Dio estas vidata kiel atenco. Al kio? Ili estas tiuj kiuj regas la personojn, la Sinjoro estas tiu kiu ilin liberigas; ili submetas, la Sinjoro estas tiu kiu servas. Ili do vidas en la projekto realigata de Dio en Jesuo denuncon de sia vivostilo.

Dio estas amo kiu metiĝas je la servo de la homoj, male tiuj kiuj pretendas lin reprezenti estas tiuj kiuj submetas kaj regas la homojn. Kaj Jesuo klopodas komprenigi al ili ankoraŭfoje, kial la amproponon Jesuo faras ankaŭ al malamikoj, kaj diras: *"Se vi ne kredas je mi kredu je la agoj"*. La agoj estas la kriterio de aŭtentikeco de la persono.

Sed nenio fareblas. Kiel li diris: *"Vi ne estas miaj ŝafoj. Vi ne aŭskultas la voĉon de Dio"*, kaj ili aŭskultos eĉ ne tiun de Jesuo. *Kaj tiam ili refoje klopodis lin kapti, sed li fuĝis de iliaj manoj.* La agado de Jesuo, kiu

manifestas la desegnon de Dio super ĉiu homo, por la religiaj aŭtoritatoj estas atenco al ilia sekureco kaj ili ĉiam klopodos lin neniigi kaj lin kontraŭstari. Sed ili nenion povos kontraŭ Jesuo aŭ kontraŭ tiuj kiuj sin konfidis al li.